

Korapa saluton!



ENHAVO

Januaro - 2002 - N° 27-a
ASTURIO

- 2....Nia Regiono
- 3....Hejma Poemo
- 4....Mozaiko
- 5....La Jusveninto
- 6....Legendo de la Sireno
- 7....Ludi
- 8....La Kiel ĉi tiu
- 9....Mesaĝoj
- 10-11. Kaldronistoj
- 12..La Amo
- 13..La Ĉef Ministro kiu Malaperis
- 14..Mirram kaj Wareen, la ĉasistoj
- 15..Amuzajoj
- 16..Festo



**REVUO DE LA AVILESA
ESPERANTO - GRUPO**


NIA REGIONO

CANDÁS (1)

Ĉi tiu apudmara vilaĝeto estas la ĉefurbo de la municipo Carreño (prononcu Karenjo). Ĝi troviĝas je 36 km. de Oviedo, ĉefurbo de Asturio. Loĝas en ĝi pli-malpli 6000 homoj. La konservaja metio, tiom elstara alitempe, subeniris kaj nuntempe la ekonomio bazas sin sur brutdredado, fiŝkaptado kaj, surtute, turismo. Candás estas tipa marhaveno, kun antikvaj stratetoj, fiŝkaptistaj drinkejoj... Rilate al gastronomio, estas tre fama ĝia ĉiujara Festivalo de la Sardino, dum la somero. Okaze de tiu, estas ankaŭ folk-muzika evento al kiu venas reprezentantoj de la atlantikaj regionoj. En la ĉirkaŭaĵoj troviĝas ankaŭ interesaj arkeologiaj spuroj, ekzemple la megalitaj monumentoj de la monto Areo. Pere de la trajno, oni povas iri, sur belega pejzaĝo, al la urboj Avileso kaj Ŝiŝono –fakte, la koncernan fervojon oni populare nomas “Carreño”-. La proksimaj strandoj estas tute ĝuindaj. Kaj ne malprofitu la bongustajn platkukojn “marañueles” (maranjueles), propraj de ĉi tiu altira loko!

(1) prononcu Kandas

La Redakcio



Estraro de ANTAŬEN

Honora Prezidanto: **Nicolás Muñiz**

Prezidanto: **Cezaro García**

Sekretariino: **M^a Luisa Menéndez**

Direktado kaj Desegno

revuo Antaŭen: **Císimo Rabanedo**

Kasisto: **Luis González**

Bibliotekistino: **M^a Isabel Murillo**

Gekomitatanoj:

M^a José Alvarez Faedo

David Menéndez

Eva González

Gene Alvarez

Lisa Ejarque

Daise Murillo

Nia adreso

Llaranes Poŝtokesto 51 (CP 33460)

AVILÉS Asturias

Tfn 98 554 11 27

antauenavilés@hotmail.com

Depósito legal:

Nº AS 1398 (9)

N.I.F. 33677378

Subvenciita per la Registaro
de la Avilesa Municipo

HEJMA POEMO

En la trankvila hejmo
estas festo ĉiutage, kaj nova suno,
ĉiam infano, ridetas kun la geinfanoj.



Vin mi benas!

La patrin' havas rideton
malfermita al feliĉeco; ĉio puras;
ĝi odoras je pano
kaj honesta laboro.
Luma optimismo donas al paroloj
muntaĵojn da vivanta oro,
kaj fuĝas la pensoj,
sur la eskalo de sonĝo, al senfino

Homa amo...

Sur la glasbreto estas rozo.
Apude libro de versoj. De la strato
levas sin ĝuo de nesto.

Aŭdatas vigla kriego
de lumo ĉe la spirito.

Homa amo...

Trezoro
iganta la koton dia,
donanta al la vivo brilojn
de ĉielarko...

Verkis: *Luis Menéndez* "Lumen"

Esperantigis: M^a Luisa Menéndez

MOZAIKO

FUNEBRO EN LA BROVOJ

En la antikva Egiptujo, kiam kato mortis, ĝiaj mastroj razis siajn brovojn kiel kondolenca gesto.



UNU PRI BATALETOJ

Je la 27 de aŭgusto de 1896 okazis la eble plej mallonga batalo de la historio. Brita Ŝiparo alproksimiĝis al la marbordo de Zanzibaro, en la Indika oceano por doni rifuzo kapitulaci la brita naŭa kaj du minutoj horo estis sinkigintaj la ŝiparon ŝipo kaj alsaltintaj la palacon.



ultimaton al la sultano. Kaŭze de la ŝiparo komencis la atakon je la matene. Nur 38 minutoj poste ili de la sultano, formita de unu




EFIKA MINISTRARO PRI PUBLIKAJ KONSTRUOJ

La inkaoj konstruis reton de vojoj kiu enhavis vastecon de 20.000 kilometroj kaj transiris la Andojn.

Dajse Murillo

LA ĴUSVENINTO (1)


Finfine. Tiom da jaroj sen meti la piedon sur la stratoj de mia kara vilaĝo. Sed revene tien. La konstruaĵoj: la kiel antaŭe-, la de Canterbury - ne?-, la estas la ŝtonetoj placplafonon?- kaj proklamas ke la urbeto, kutime gustas pli pura? de industrio. Nu, fiŝkaptista



simbolaj ĉiamaj Urbodomo -ja aspektas preĝejo Sankta Tomaso ŝajne pli blankigita, ĉu konservatorio -kie do kiuj ornamis la ĉu mi eraras, se mi aero -strange por ĉi tiu konsiderita poluciita-Kompreneble, la manko kio okazis al la tipa kvartalo? Ĉu vere ĝi

estas denove la 'ejo' por la nokta diboĉado de la lokaj gejunuloj? Ĝuste kiel antaŭ 30 jaroj, kiam mi mem povis senhonte ĝui la plezuron amikumi. Kurioze, kiel la modaj drinkozonoj ŝanĝiĝas. Laŭ miaj genevoj skribis al mi, la lasta kutima pejzaĝo por tiaj aferoj estis la strato Rivero. Ha! Mi rememoras nun tiun mezfrenezan amikon kiu diris ke la nomo de la strato signifas 'rivero' en tiu stranga kvazaŭ internacia lingvo...

diabla li ĝin nomis? Negravas, nun... mi iru en la parkon Ferrera, vidi da grandaj verdejoj tute ne maltaŭgos al mi. Kiom mi ludis, infane, en ĉi tiu loko! Kiaj plezuraj rememoraĵoj! Ho, mi vidas ke ili donas nomon al la promenejoj de la Kio tekstas tie? "Promenejo de Esperanto". Jes ja, tiu estas la nomo stranga lingvo! Nu, ĝi devas esti afero, se ĝi vere meritas platon de la avilesa strataro. Eble iu pli ol mia songema amiko parolas en ĉi tiu urbo tiun ĵargonon...



Kiel Nun iomete

kiam

daŭre parko.

de tia grava

doktoro atendanto

LEGENDO DE LA SIRENO



La malbeno de Serena.

Serena estas junulino kun ununura malperfektaĵo: beleta kiel suno, svelta kiel vimenvergo, kantema kiel birdo; sed tiel ama kuri sur la apudmaraj rokoj por serĉi krustulojn, ke ŝi preskaŭ frenezigis sian patrinon.

-Je la nomo de Dio, virino! – plendis la patrino kvardek fojojn po tago- Estu trankvila en la hejmo momenton. Vi ja pasigas la vivon je la rokoj. Sed ŝi tute prifajfis. Tiom, ke ŝia kompatinda patrino fine diris al ŝi unu matenon:

-Dio bonvolu transsorĉi vin en fiŝon..

Kaj enmetinte sin en la akvo tiun vesperon por kapti anatifon, Serena deziris naĝi kaj ĝin ekfari, rimarkis siajn krurojn faritaj fiŝvosto. Ŝi tuŝis siajn skvamojn kaj ekkriis. Ŝi jam estis konvertita en fiŝon, kiel sia patrino .petis al Dio en furioza momento.

Sed ŝi ne malfrue konsolis sin, plonĝante en la akvon, kaj eksidis sur la rokoj kantante dolĉegajn kanzonojn kaj foje trompante la homojn logitaj de sia voĉo kaj venĝante sin je la malbeno de sia patrino.

Ludoviko

Kaŭze de la kristnasko, ĉiujare je ĉi tiu tempo en la okcidentaj landoj, kaj pli konkrete en tiuj de kristana kulturo, la televido bombardas niajn geinfanojn per

anoncoj de ludiloj. Mi granda parto de estas elstaraj malgranduloj

iĝas reĝoj je unu tago kaj plenigas ilin je donacoj. nun ĝendiĝi pri la troaj porinfanaj produktoj nek nejusteco kiun oni kreas komparas la kvaliton de faritaj per pinta akiritaj de la plejriĉuloj, modestaj kiujn, ne sen sakrifiko, atingas aĉeti la familioj.



nenombreblaj propagandaj celantaj al la konsumado supozas ke en la plej la planedo certe

datoj en kiuj la de la hejmo la granduloj Mi ne volas prezoj de tiuj pri la socia se ni tiuj ludiloj teknologio, kun aliaj pli malmulta plej humilaj



Sed mi ja ŝatus emfazigi la difekton estigata en la infanaj mensoj de tiu propaganda alfluo kiu senpauze emigas ilin konsumadi pli kaj pli sen rezono ĝis la punkto forlasi sur angulo, ekzemple, sian preferatan muŝecon, aŭ pensi ke sia novega biciklo valoras nenion ĉar ĝi ne portas determinitan markon.

Aliflanke, estas mia deziro peti al la gepatroj ke ili pripensu antaŭ ol ekhavi tiajn produktojn kiuj, en la plejmulto de la kazoj, malgraŭ ke ili estas tiel vidindaj, ne adekvatas por ludi. Jes, ili ja disponas je lumoj, soniloj, ili moviĝas; definitive, ili faras ĉion ajn, kaj tial ili fine enuigas la geinfanon, kiu, ne povante partopreni, sentas sin forigita de tiu ludo. Se oni vere intencas ke niaj gefiloj estu la reĝoj de la hejmo, la plejbono ne estas prioritare havigi al ili malĉipan ludilon; la solvo estas multe pli facila: ni dediĉu al ili nian atenton, ni dediĉu al ili nian ĉiufoje pli skantan libertempon, ni al ili legu libron. Finfine, ni ludu kun ili.

Teresa Gutiérrez

ASTURA POEZIO

COMO ESTI CABALLU...

Como esti caballu que se cozca
a la portiella y se dexa afalagar poles tos manes
son los mios suaños, que
de les vegues piano,
onde posa la fráxil dolosía
levantando, dacuando, les
fervientes,
el focicu arrechu,
oreyes
col enfotu d'alcontrate
n'alborada.

van triando'l verde


dexando güelgues

de la rosada,

vidayes

espurriendo les

cerque



KIEL ĈI TIU ĈEVALO...

Kiel ĉi tiu ĉevalo kiu apudiĝas
al la pordo kaj lasas sin karesati de viaj manoj
estas miaj sonĝoj, kiuj iras surpaŝante la verdon
de la herbejo malrapide, lasante spurojn
kie kuŝas la fragila doloro de la roso,
levante, iam, la bolantajn tempiojn,
la firman muzelon, alproksimigante la orelojn
kun la fido cin trovi proksime je la tagiĝo.

XABIERO CAYARGA

(prononcu ŝabjero kajarga)

MESAĜOJ

Ho, kia feliĉeco! Kian animgrandecon spertis ĉiuj membroj de nia avilesa grupo ANTAŬEN! Ekde la la pasinta septembro ni apartenas al la aro da asocioj en kies lando oni povas vidi iun signalon atestanta la ekzistadon de Esperanto-lernantoj. Ni jam povas montri kun fiereco nian novan "promenejon de Esperanto", situanta en la bela parko Ferrera, centre de Avileso.

De kiam ni ekfunciis kiel Esperanto-grupo ni celebras la Zamenhof-tagon. En Asturio laboras du lokaj asocioj –tiu de Ŝiŝono kaj tiu de Avileso-. La ĵusfinintan jaron ni havis nian feston en nia urbo. Kvankam iomete urĝe, ni fine disponis je la Kulturdomo por fari prelegon pri Esperanto celita al la tuta avilesa loĝantaro. Poste ni oferis bukedon dediĉita al Zamenhof ĉe la promenejo de Esperanto. Kaj fine ni havis nian kutiman fratecan manĝadon. Kaj kompreneble, ne mankis ankaŭ, plezure, niaj gesamideanoj de la najbara urbo – tridek kilometroj ne sufiĉas por malkuraĝigi veran samideanon!-. Por la venonta jaro estas ilia vico organizi ĉion.

Kvankam ne tro profesie, ni ekis funkcii, pli malpli fuŝe, en la Interreto. Vi eksci ke vi nun povas kontakti nin je la jena adreso:

antauenaviles@hotmail.com

NEKROLOGO


Dum la pasinta septembro forpasis en Valladolid la eminenta esperantisto sro. Jacinto Urueña. Inter multe da laboroj pri E-o li estis bibliotekisto kaj membro de la estraro de sia grupo. Tia perdo doloras nin tiel kiel sian filinon Rafaela Urueña, digna sekvontino de la ekzemplo de sia patro.

Ankaŭ ni eksciis ke en majo forlasis nin du leteramikoj: Timofej Ŝurfajev, de Siberio kaj Kalju Junts, de Estonio.

Ĉiuj la membroj de nia asocio dolorigas kaŭze de la forpaso de Rosa Morán tre kora samideanino tiel agrabla kiel laborema de nia grupo Antaŭen.

Ni ĉiuj kondolencas liajn familianoj kaj geamikojn.

Ili ripozu pace.



ASTURAJ MOROJ KAJ FESTOJ

KALDRONISTOJ DE MIRANDA

Miranda estas vilaĝeto apartenanta al municipo de Avilés, de kies urbo distancas 4 km. pli-malpli.

Dum jarcentoj Miranda estis tre aktiva metieja kerno. Tie kunvivis, interaliaj, teksistoj, tegolisto kaj ankaŭ kaldronistoj de l'kupro, kiuj ellaboradis kuirkaldronojn kaj ĉiaspecajn kuirilojn.

La plej multo el tiuj metiistoj vojaĝadis po du foje ĉiujare al najbaraj provincoj de León kaj Galikujo, por vendi iliajn artefaritaĵojn.

Ĉiuj asocioj establiĝitaj kaj en Avilés, kaj en la ceteraj lokoj el Asturio, havis sian propran slangon, sian argoton, por interparoli pri aferoj rilatantaj kun iliaj metioj, kun la celo ne esti komprenataj de fremduloj. La kaldronistoj de l'kupro uzadis la t.n. "bron"-n.

Malgraŭ tio ke la metio kaldronisto jam de longe malaperis pro



La lasta kaldronisto ricevis specialan platon kiel premio al sia sen laca laboro

la aperado de novaj teknikoj kaj uzado de aliaj pli taŭgaj mataloj, kiel ŝtalo aŭ zinko, ilia parolmaniero ankoraŭ postvivas iliajn elpensintojn. La tago de Sankta Domingo, la 6^a de Aŭgusto, estas la loka festotago de Miranda. La organizantoj okaze tiu evento, lanĉas broŝuron informantan pri la celebrotaj aktoj. En tiu broŝuro ankaŭ havas specialan lokon, ĉiujare, malfermitan leteron kiu la pastro adresas iliajn paroĥanojn en slango "bron" kio, aliflanke, estas parto de ilia kulturo.

Ili preĝas kaj kantas en "bron".

Jen kelkaj vortoj de ĉi slango kaj ilia traduko al la internacia lingvo:

Raso = pastro ; padela = pato ; xagó (elp. ŝago) = Mirandano, kaldronisto, amiko, k.a. ; xarapa (ŝarapa) = cidro ; lis-lás (lis-las) = horloĝo ; ansiera = akvo

Iu strando proksima al Aviles ricevas la nomon Xagó-n.

La pastro de Miranda, esploranto kaj interesiĝanto pri la lokaj tradicioj, aŭtoro de diversaj libroj, trovis for de Avilès kelkajn urbetojn kie la “bron” estas parolata.

Eĉ en Francio li trovis spurojn de ĉi slango. Tial, li intuciis ke iuj el la vortoj, kiujn li konas, povus havi francan devenon, ĉar onomatopeje similas aliajn de tiu lingvo.


Jen du ekzemploj:

Fromaxe (fromaĝe), de la franca fromage, t.e., fromaĝo en la internacia lingvo, kaj xen (ŝen), de la franca chien, t.e., hundo.

La Avilesa urbestro starigis monumenton kiel omaĝo al la kaldronistoj en Placo Sankta Ana, en la centro mem de la vilaĝo, kies inaŭguro okazis en la jaro 1996, kun la jena subskribo:

“El garo xagó a los machiladores (maĉiladores) del coure”, kio signifas: “La urbo de Miranda al la kaldronistoj de l’kupro.

90000



Monumento starigita kiel omaĝo al la kaldronisto

LA AMO

Ekzistas la amo, la vojo translima
ties sereno – lageto lunglima
ties beleco - elvizaĝspegula
ties boneco – la pacon plenuma
ties riĉeco – humaneckuna
ties brilemo – eterne luma

LA KRESKADO...

Ĝis iun tagon renkontado
kun Esperanto
komenciĝas nova kreskado,
ĝis iun jaron nestas Amo
kun Esperanto
kaj naskiĝido estas Paco
kaj universe lulas la Mondo
kun Esperanto
sur amikeca animondo.

“Arbara Stelo”
Finnlando



LA ĈEFMINISTRO KIU MALAPERIS

Homo ĉirkaŭ la terglobo bone scias ke la plimulto de Aŭstralianoj ŝatas ekskursi al la plaĝo, ĉu por naĝi, ĉu por promeni, sunbaniĝi, pikniki, ktp.

Sed kiu el ni imagis ke nia ĉefministro senaverte, senspure dronos en la surfo? Tiu katastrofo okazis dum ferio kun liaj familio kaj geamikoj ĉe la belega Strando Cheviot en la ŝtato Viktorio.

La ĉefministro estis la 59-jaraĝa Harold Holt, kaj la jaro estis 1967. La danĝera subfluo ĉe la Strando Cheviot estis bone konata kiel evitinda naĝiloko, kaj la plimulto de liaj geamikoj kaj familianoj rifuzis eniri tiun akvon. Sed Harold Holt sentime enploĝis kaj fornaĝis, kune kun juna amiko Alan Stewart. Je kelka distanco de la marbordo, Stewart sentis fortegan kontraŭfluan kaj rapide naĝis returne al la marbordo. Holt, tamen, senzorge antaŭen sin pelis. Subite la akvo ĉirkaŭ li ektumultis kaj bolis kvazaŭ kaldrono. Holt malaperis.

Centoj da plongistoj serĉis subakve, soldatoj kontrolis laŭ la sablo ĝis distanco de 48 kilometroj, kaj helikopteroj malalte flugis super la ondoj, sed malgraŭ plena sestaga serĉado, lia kadavro ne estis trovita.

La popolo komencis demandi:

- kial la ĉefministro naĝis ĉe tiu famaĉa loko
- ĉu li sin mortigis pro politika premado? (Li ja favoris la partoprenon de Aŭstralio en la Vietnamita milito)
- ĉu estas vera la onidiro ke li montris indikojn de baldaŭa nervkolapso?
-

En 1983, libro titolita *La ĉefministro estis spiono*, verkita de Anthony Grey, asertis ke Holt ne dronis, sed ke li naĝis al submara ŝipo kiu atendis lin, kaj rapide estis forprenita al Ĉinio. La aŭtoro ankaŭ asertis ke Holt favoris la socialisma sistemon, ke li transdonis informojn al Ĉinio, kaj kiam li timis baldaŭan malkovriĝon, li aranĝis sian eskapon.

Tiu pretendo ridigis la popolon, ĉar ĝi ŝajnis esti tute nekredebla. Tamen, pro la manko de kadavro, la imago povas vagi laŭvole.



Harold Holt

Patriŝa Harkin

Aŭstralio

MIRRAM KAJ WAREEN, LA ĈASISTOJ

En la praa sonĝotempo, Mirram (pr. míram) kaj Wareen (pr. ŭárin) estis fortaj, lertegaj ĉasistoj kaj tre intimaj amikoj. Tamen, kvankam ili kune travagadis la landon kaj ĉiam kundividis la manĝaĵon gajnitan, ili ambaŭ havis siajn ŝatojn kaj malŝatojn, tutsame kiel la homoj tiujn nun havas.

Nokte, Ŭareen volis havi tegmenton super la kapo, do li ĉiam faris al si ŝirmejon; sed Mirram preferis la liberecon de la vasta spaco, kaj dormadis sub la steloj.

Ĉio daŭris glate ĝis , en unu nokto, venis pluvego, kiu estingis la fajron de Mirram. Malvarmega, malseka, kaj sin kompatanta, Mirram pensis pri Ŭareen, verŝajne varma kaj seka en la ŝirmejo.

Dum la pluvo pliiĝis kaj la vento fleksadis la arbojn kaj arbustojn, Mirram kuris al Ŭareen por peti ŝirmon kontraŭ la ŝtormo.

Sed Ŭareen estis en malbona humoro, kaj li rifuzis kundividi sian ŝirmejon kun iu, kiu estis tro mallaborema por konstrui ŝirmejon por si mem.

Ŝokita, poste kolerega pro la malagrabra sinteno de sia amiko, Mirram prenis grandan ŝtonon kaj ĵetegis ĝin al Ŭareen. Ĝi trafis lin ĉe la kapo tiel forte, ke la frunto de Ŭareen platiĝis. Muĝante pro doloro, Ŭareen ĵetis lancon, kio penetris funde en la spinon de Mirram.

Ŭareen, kun sia platigita frunto, iĝis la Vombato, ĉiam destinita loĝi en profunda, malluma, subtera kaverno. Mirram, kun la lanco de Ŭareen nun kreskinta en longan dikan voston, iĝis la Kanguruo, kiu ankoraŭ sekvas la amon de sia prapatro al la vastaj ebenaĵoj. Tiuj bestoj ankoraŭ estas malamikaj, kaj penadas eviti unu la alian.

Tradukita de John Moore, Rockhampton.

Kunlaborantino: Jennifer R. Biscop (Australio)



1 2 3 4 5

A					
B					
C					
D					
E					

Plena Unu-Minuta Kvin
Kvadrata KrucVorto

® = nur la radiko

- A Parizo laŭ la U.N.
 B Foksimila besto kun eksteraj oreloj ®
 C Duonvarma - Duonmalvarma ®
 D Regula vento deturnata okcidenten pro la terrotacio ®
 E Kvalifikas produktoj el natria karbonato

- 1 Kalia karbonato ®
 2 Amerika simio kun longa prenpoŝto
 3 Aganta en nur malmulta da tempo ®
 4 Prezenta ĉielarkajn nuancojn laŭ la movo de la observanto
 5 Loko kie lu aŭ io sidas ®

Solvoj antaŭa revuo

- | | |
|---------|---------|
| A Korak | 1 Karaj |
| B Amori | 2 Omenu |
| C Remos | 3 Roman |
| D Aname | 4 Aroma |
| E Junaj | 5 Kisej |

PETAĴO

Mi petas humorajn el diversaj landoj por
 Publikigi en ĉi tiu revuo. (mi antaŭdankas)
 Sendu al:

CÍSIMO R. SIMÓN
 c/ La magdalena nº 26 - 1º D

ZAMENHOFA FESTO AVILÉS 2001

Karaj geamikoj kaj samideanoj:

Ni komunikas al vi ke la avilesa esperantista grupo Antaŭen organizos ĉijare la 142-an datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof la dimanĉon 16-a de decembro en Avilés laŭ la jena programo:

11-12h: disdonado de broŝuroj informante pri Esperanto sur la promenejo Esperanto en la parko Ferrera.

12h: konferenco pri la temo "Esperanto kaj Avilés" en la Kulturdomo (en Esperanto kaj tuja tradukado al Hispana lingvo) fare de Cesáreo García, prezidanto de Antaŭen.

13h: oferado de florbukedoj apud la nomplatoj de la promenejo Esperanto.

13'30h: amika kunveno, kun gustumado de vino kaj aliaj trinkaĵoj ĉe la manĝejo La Estaca (strato Llano Ponte, 25).

14h: frateca manĝado en la manĝejo La Estaca.

Ni havas la plezuron inviti vin partopreni la programon kaj ĝui feliĉan tagon kune. Samtempe ni deziras al vi, ĉiuj, feliĉan Kristnaskon kaj prosperan Novan jaron 2002.

Telefonoj por sciigi al ni vian ĉeeston: 985 54 11 27 kaj 985 57 12 95.
Bonvolu komuniki ĝin antaŭ la vendredo 14 de decembro. Dankon!

MENUO :

- 1. Supo el marbestoj (sopa de marisco)**
aŭ kuko de miksitaj fiŝoj (pastel de cabracho)
aŭ fazeoloj kun mituloj (fabes con almejes)
- 2. Eskalopetoj kun fromaĝo (escalopines al cabrales)**
aŭ bovidaĵo kun garnituro (ternera gobernada)
aŭ lubrako kun mituloj kaj "guloj" (lubina con almejas y gulas)
- 3. Deserto, pano, trinkaĵoj kaj kafo.**
(postre, pan, bebidas y café)

PREZO:
1500
pesetojn.